

Bonan vesperon, karaj samideanoj!

Mia hodiaŭa temo nomiĝas MIA INTERKONATIĜADO KUN SPIRITECO. La temon de mia prelego mi plilarĝigis konekse kun historiaj interrilatoj. Ĉi tiu prelego naskiĝis enkadre de mia ĉiutaga trejnado al la centria UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, kiu efektiviĝos en Lisbono en Portugalio je la turnopunkto de la monatoj julio kaj aŭgusto. Mia ĉeestanta numero estas 643.

... Je la komenco mi volus iomete enpeniĝi kaj diri kelkajn vortojn pri aferoj, kiuj pezigas min. Ne timu, dumparole mi ne tuŝos la nuntempan politikan situacion en nia lando... Samtempe mi esperas, ke tio ne estos por vi nur malplenaj vortoj. Komprenoble, mi kalkulas kun la fakto, ke neniuj homoj estas centprocentaj... do, mi petas vin pri pardono de miaj eraroj, kiuj efektiviĝis plejparte nescie... Por ke mia prelego estiĝu pli interesa, mi intermetis ĝin per frazeologismoj el Ĉeĥa-esperanta frazeologia vortaro de Josef Cink. Tial mi petas vin, prenu mian prelegon kiel la lingvan ekzercadon. Elkoran dankon!

Do, ni komencu kun GRANDĈARMA AFERO de la homa historio, kiu nomiĝas ESPERANTO. Laŭ mia opinio ni tute en la aferoj ĉirkaŭ internacia lingvo forgesis kaj forgesas memori primaran iniciatinton de la pensoj pri justa lingvo por ĉiuj homoj - JOHANON AMOSON KOMENION! Li estis elstara filozofo, fondinto de la moderna pedagogio, ĉefa reprezentanto de la ĉeĥa kulturo en la deksepa jarcento. Li estis akra kritikanto de la sociaj malpravaĵoj de la militoj, servante al la pacideoj per siaj verkoj, kiel ekzemple en LA VOJO DE LA PACO aŭ en la VOJO DE LA LUMO (en la latina lingvo Via lucis). En la lasta li proponas krei internacian sciencistaron por komuna solvado de scienc- kaj pacproblemoj, kies tasko estus gardostari al la paco, al feliĉo de la homa gento, kaj serĉi la vojon de la saĝo por paco sur la Tero. Unu aspekto de la verko estas speciale atentinda, nome, ke KOMENIO jam montras en ĝi, kian malhelpon en la internaciaj rilatoj kaŭzas lingvodiverseco, kaj samtempe pledas por la ARTEFARITA LINGVO ĝenerale uzota de la tuta homaro. Pri granda humanismo de KOMENIO atestas ĉi tiuj liaj

vortoj:“ Al la esenco de la homeco apartenas sinkonduko perracia... ne agi laŭ la pasio, kolero, perforto aŭ armilo. En tio estas io besta kaj oni ne povas tion plu toleri.“ Laŭ mia opinio temas pri tre admirindaj vortoj en la deksepa jarcento!

Mi petas, rapide elpovigu kaj riparu ĉi tiun nian malĝojigan rilaton al LA ĈEĤA GENIO de la dek sepa jarcento!

En mia antaŭa prelego mi diris, ke ESPERANTO ludas en mia vivo tre grandan rolon. Mi estas en situacio, kiam mi kiel pensiulo bezonas ĉefe vivi sen laco kaj en paco, iomete ekzemple en trankvila medio kun iu resti en babilo. Sed atingi la trankvilon estas post tre komplika vivo granda malfacilaĵo. Kontraŭ maljunaĝo ne estas bandaĝo. Mi scias, ke mi tre ofte ne havas emon paroli. Ofte mi diras al mi: ne lasu vin maltrankviligi kaj samtempe mi sentas, ke mi tre volas kaj bezonas plenigi min per nova vivenergio.

Ie mi legis, ke ESPERANTO estas la dua la plej granda eltrovo de la tuta homa historio tuj post la eltrovo de la presado (GUTENBERGO). Hodiaŭ la kondiĉoj en la mondo pri tio ne atestas, sed laŭ mia opinio la homoj ne povas kaj ne devas esti apatiaj aŭ eĉ stultaj ĉirkaŭ iliaj lingvaj problemoj! La fortaj ŝtatoj kun siaj lingvoj humiligas senhonte malgrandajn ŝtatojn kaj nenio okazas... nur altiĝas malkontenteco inter la premataj landoj. La estroj de Eŭropa Unio staras sur la malbona flanko de la lingva barikado. Ili gravmienas ke ĉirkaŭ la lingvoj estas en EU ĉio en la ordo. Sed kia estas la reala vero? Pli multe da homoj vidas, ke anstataŭ saĝeco regas en EU malklereco, dominas anarkio aŭ konfuzo, ie eĉ psika tiraneco en rilatoj al homoj. Sed, miaj karaj geamikoj, EN ĈIU TEMPO ĈIO ESTAS EBLA INTER LA TERO KAJ LA ĈIELO, ANKAŭ PLI BONA TEMPO POR ESPERANTO! Tiaj estas, laŭ miaj spertoj, leĝoj de nia universo. Kaj ni ĝenerale scias, ke sperto estas la plej bona instruisto. Sperto saĝon akriĝas. Per sperto la homo estiĝas eksperto. Kiu iras sperte, iras certe. Tial ne demandu materialismajn scienculojn de nia mondo, demandu spertulojn de ĈIUTAGA VIVO...En mia vivo la fina rezulto estas certa, same kiel du plus du estas kvar.... ESPERANTO VENKOS, ĈIU ALIA VOJO ESTAS BLINDA!

Ĉiu homo estas originalo. Ĉiu vivas originalan vivon. Neniu el ni havas da tempo por perdi. Tre rapide la horloĝo formanĝas la eter-non. La homo matenmanĝas... vespermanĝas kaj... la tago malape-ras... Pri tio, kia estos la vivo de homo decidas ĉiu mem, sed ankaŭ ĉefe en la komencoj de lia vivo liaj gepatroj.

Mian ses-dek-kvin-jaran vivon mi povas tempe dividi je tri ĉefajn partojn. La unua parto daŭris ĝis miaj dek kvin jarojn en la jaro 1968, kiam finiĝis mia infaneco kaj mi foriris de mia hejmo en la mondon, studi armean gimnazion en Moravská Třebová 400 kilometrojn de mia hejmo. Mi devas agnoski, ke mi tiam hejme sentis min kiel nuda en dornaĵo kruda. Tio estis la vera motivo de mia foriro. La dua parto daŭris ĝis la jaro 1989, kiam mi estis tridek sep jara kaj la tria parto daŭras de la jaro 1989 ĝis hodiaŭ. La unua kaj la tria partoj estis sub la influo de idealismo. La dua parto estis malmole materialisma.

Mi komencos kun la unua parto de mia vivo. Mi naskiĝis en la jaro 1952 en la urbo Tachov. Kiaj estis miaj antaŭuloj? Mia familio laŭ la patra linio estis kristana katolika kaj tre konservativa. Ĝi regule dimanĉe vizitis liturgion. Mia patro jam kiel fraŭlo estis malfacila nervema homo kun la pezaj vivaj travivaĵoj. Li ne estis tute psike sana, ĉar li komence la kvardekaj jaroj dum la dua mondmilito peze devige laboris en Germanio dum totala surfiksado. De tie li fuĝis kaj ĝis la fino de la milito li devis kaŝi. Post la fino de la milito li foriris kun siaj gepatroj el la loĝloko Zbilidy apud Jihlava koloniigi la distrikton Tachov, de kie devige devis foriri Germanoj kunlaborantaj kun la imperio de Hitler. La ĉefa motivo por transloĝigo de miaj antaŭuloj estis akiri esperplenajn kondiĉojn por privata agrokulturado, ĉar mia patro antaŭe finis agrokulturan lernejon. Lia revo estis private mast-rumi. En la jaro 1946 la familio loĝiĝis en la vilaĝo Třískolupy, kie ĝi ricevis la domon numero 21. La situacio jam de la komenco ne estis favora, ĉar la vilaĝo estiĝis kovejo de komunismaj familioj. Do ili sentis sin kiel nuda en dornaĵo kruda. En la vilaĝon ankoraŭ alveturis familio de mia patrino el Ukrainio, jam bedaŭrinde sen mia avino, kiu tie mortis. La familio estis ortodoksa. Mia avo Václav Dreger en la

milito trairis kun la korpuso de generalo Svoboda de Sovet-unio ĝis Prago. Li akiris dum la milito 7 honorigojn.

Kio okazis en la vilaĝo Třískolupy? En februaro de la jaro 1948 venkis komunistoj same kiel en la tuta lando. En la mallonga tempo je la fino de la kvardekaj jaroj mia patrino Ludmila kaj mia patro Václav en-amiĝis. Sed en la vilaĝo okazis katastrofo, ĉar preskaŭ ĉiuj domoj inkluzive de niaj brulruiniĝis. Iuj loĝantoj restis, ankaŭ familio Horáček, kaj riparis la domojn. Sed la familio Dreger transloĝiĝis en la distancon 30 kilometrojn al la urbo Horšovský Týn en distrikto Domažlice. La vilaĝo nomiĝis Polžice. Komprenoble alvenis la malfacila tempo por la amo de Ludmila kaj Václav. Kelke da lokaj junuloj volis akiri belan knabinon por si mem. La amantoj elsolvis la malagrablan situacion per geedziĝo, sed kontraŭ la opinio de la gepatroj Horáček. Post la geedziĝo, kiu okazis en Horšovský Týn dum Kristnasko de la jaro 1949 sen la gepatroj Horáček, la geedzoj vivis aparte la unua en Třískolupy kaj la dua en Polžice.

Sed hazardo ne funkcias...La malagrablan situacion de la familio elsol-vis komunistoj en vilaĝo Třískolupy. Post la Novjaro 1951 ricevis miaj geavoj František kaj Františka Horáček pro la malamikeco al komunis-ma reĝimo la elmigran dekretan de la vilaĝo Třískolupy al la arbara solejo Valcha... Tuj post foriro de miaj geavoj povis miaj gepatroj fine komenci kune vivi en vilaĝo Třískolupy. Ili estis komencantaj kun malplenaj manoj. Tie estis multe da laboro necesa kaj senĉesa. Ĉiu-tage Ili ambaŭ peze komencis labori en unueca agrokoooperativo (ĉeĥe JZD). Baldaŭ alvenis pliiĝo de la loĝantaro, somere en la jaro 1951 naskiĝis mia frato Václav kaj aŭtune 1952 mi.

La kondiĉoj de la familio abrupte malboniĝis, ĉar mia patro mal-sanis kaj mia familio estis eksigita el unueca agrokoooperativo. Miaj gepatroj devis agrokulture mastrumi private. Ili suferis mizeron. La familio ne estis kapabla plenumi devigan kontingenton al la ŝtato. La plej malbone ĉion travivis ni, la infanoj.

Dum kvindekaj jaroj de la antaŭa jarcento en la vilaĝoj ne estis infanĝardenoj kaj familioj sen geavoj havis grandajn problemojn. Gepatroj estis en laborkampo kaj malgandaj infanoj sen kontrolo vagis

kaj ludis ie ajn en la vilaĝo.. Pli maljunaj infanoj vartis pli ju-najn. Ekzemple mi estiel trijara knabeto dum ludo en ia konstruejo havis plenajn gumbotojn de kalko kaj poste trakuris en loka roĵo...tio estis granda teruraĵo, ĉar sur miaj piedetoj mi havis profundajn vundojn, kiuj estis videblaj ankoraŭ longajn jarojn..

Kiel mi jam diris la situacio en kvindekaj jaroj estis terura. Ni vivis ĝis la jaro 1955 en granda malriĉeco kaj en la jaro 1955 denove miaj gepatroj laboris en la unueca agro-kooperativo.. Ĉie en agrokulturado regis komunistoj sen klereco kaj ĉie estis granda ĥaoso kaj malkontenteco de kooperativanoj...La kooperativo estis en tiel granda krizo, ke mia patro, kiu sola havis agrokulturan klerecon estiĝis prezidanto de la unueca agro-kooperativo. Mia patrino akre ne konsentis, sed sensukcese. Li estis tre sukcesa prezidanto de la kooperativo sed dum la jaro 1956 estiel nefidinda civitano li estis de la kvina novembro ĝis la dudek kvara decembro 1956 rekrutita al la ŝtatli-mo de la Slovakio kaj Hungario, kie estis revolucio kontraŭ komunisma reĝimo. Kelkaj liaj kamaradoj ne revenis vivaj de tie. Post sia reveno, printempe de la jaro 1957 li en la funkcio de prezidanto de kooperativo abdikis.

La situacio de nia kristana familio en la komunisma vilaĝo poste abrupte pli malboniĝis, estis terura. Tiel terura, ke somere en la jaro 1957 devis mia patrino, mi kvinjara kaj mia sesjara frato el vilaĝo Třískolupy nokte fuĝi al mia avo Dreger, kiu vivis en la najbara distrikto Domažlice. Mia patro fuĝis pli malfrue al siaj gepatroj. Alvenis seriozaj problemoj. Li estis preskaŭ malliberigita, ĉar la unueca agro-kooperativo prezentis akuzon al kriminala tribunalo. Dank al Dio savis lin la ŝtata decido pri nuligo de unuecaj agro-kooperativoj en la distrikto Tachov al la unua januaro 1958. Ili ŝanĝis je la ŝtataj bienoj.

La tri sekvantaj jaroj ĝis la printempo en la jaro 1960 estis por nia familio tre malfacilaj...nur reciprokaj vizitoj inter la gepatroj kaj la infanoj. La ŝanĝo alvenis nur mallonge en la jaro 1959, kiam nia tuta familio, la patro, la patrino kaj du infanoj komencis kune vivi ĉe la geavoj Horáček en la arbara solejo Valcha. Tie mi, sesjara, komencis

viziti la fundamentan lernejon kaj ankaŭ la preĝejon en Bernartice. Tie efektiviĝis mia unua kaj serioza socia interkonatiĝo kun spiriteco. La distanco de Valcha estis proksimume 3 kilometrojn. Tiam mi fakte komencis senti influon de spirita edukado de flanko de miaj geavoj. Edukado en kristana familio kaj en socio estis en granda kontrasto. Ĉiutage mi en la hejmo aŭdis: tion vi nenie ekstere diru! En mia infana kapo regis absoluta konfuzo...sed jam de frua junaĝo gvide rolis mia konscienco.

Bedaŭrinde, la eksperimento vivi kun gepatroj de mia patro post la unu jaro fiaskis. Tiam okazis hodiaŭ neimagebla afero. Mi vizitis la unuan klason de la fundamenta lernejo kaj mia frato la trian. La vintro ekatakis. Ĉie estis neĝo ĝis genuoj. Unufoje komence de la januaro 1960 mi kun mia frato alvenis malfrue en la lernejon. Tra la serurtruo de pordo ĉe nia klaso ni vidis, ke nia instruisto ne ĉeestas. Tie estis nekonata virino. En tuja momenteto ni pafrapide elkuris for de tie kaj por la tuta semajno ni adiaŭis kun lernejo. Matene ni foriris normale de la hejmo kaj direktiĝis al la lernejo, sed haltis je la fino de arbaro... kaj ludfacile ni estiĝis partizanoj! Sed dimanĉe en la preĝejo ĉio fiaskis kaj malkaŝis, ĉar nia instruisto estis tie kaj demandis de miaj geavoj ĉu ni estas malsanaj....Kompreneble sekvis granda batpuno per betula vergaĵo...

... Tio estis la lasta guto, kiu plenigis pokalon. Kaj tuj lunde ree mia patrino, mi kaj mia frato fuĝis tiutempe al la frato de mia patrino, kiu vivis dudek kilometrojn de Bernartice. Ni iris tien piede....Sekvis la sama travivaĵo, kiun mi jam konis... reciprokaj vizitoj kaj solvado de problemoj inter miaj gepatroj... por la infanoj unuvorte teruraĵo!

... Alvenis la printempo de la jaro 1960 kaj nia malĝojiga situacio estis fine solvita. Nia familio fine ekloĝis en la urbeto Stráž, kie niaj gepatroj helpe de la avo Dreger kaj helpe de forstadministracio aĉetis belan dometon. Mia patro laboris jam de la jaro 1958 ĉe forstadministracio unue kiel arbara laboristo kaj poste estiel arbaristo kaj mia patrino laboris ĉe mia patro kiel arbara laboristino...

...Fine alvenis la konvena tempo por nia pli trankvila familia vivo.

En la socio ŝajne venkis komunistoj kaj proklamis la socialisman respublikon. En la familio daŭrigis la spirita edukado de infanoj. Same kiel pli frue la edukado en nia kristana familio kaj en socio estis en antagonisma kontrasto. Ree mi ĉiutage en la hejmo aŭdis: tion vi nenie ekstere diru! En mia infana kapo daŭris absoluta konfuzo...

...Mia patro rifuzis serveme salteti antaŭ la komunisma reĝimo. Li iris kun ekzemplero de la socialisma konstitucio en lernejon kaj kelkoble postulis enkondukon de religio. Kompreneble sensukcese kaj ankoraŭ kun minacoj. La tuta mia familio ĉiudimanĉe vizitadis liturgion kaj mi estiĝis mesknabo. Bedaŭrinde nia vizitado de preĝejo en la jaro 1963 finiĝis ĉar la komunisma reĝimo tie intervenis. Dum mia ĉeesto estis nia paroĥestro arestita. Tio estis por mi granda bato.

Kia infaneco mi havis? Mi fermis min en mia memo kaj havis malmulte da kamaradoj. Jam kiel malgranda knabo mi estis tre respondeca. El severa edukado en familio sekvis, ke mi klopodis ĉion fari sen riproĉoj de la konscienco. Senmakula konscienco havis ĉe mi gvidan postenon. Eble pro la simpla motivo, mi tre timis de mia tre severa patro. Li ĉiun infanan kolerigadon punis, ofte per lia betula vergaĵo. En la familio regis senlima kaj blinda obeemo. Ofte savis min mia granda amo al sportado. Ĉiun liberan tempon mi kuradis aŭ piedpilkkludis.

...En pubera aĝo miaj problemoj kun la patro pli malboniĝis. La malbona situacio kulminis dum vizito de mia instruistino en nia familio. Ŝi kondukis min en lerneja interesrondeto. Ŝi plendis kontraŭ mi pro iu banalaĵo. Mia patro faris teruran stultaĵon. Antaŭ la instruistino li komencis min bati per betula vergaĵo. Mi fuĝis eksteren kaj alvenis malfrue nokte. Tiam mi studis la okan klason de la fundamenta lernejo. Mi decidis fuĝi el nia familio. Venonttage en la lernejo okazis varbado en armean gimnazion, kiu situis en Moravská Třebová, do 400 kilometrojn de mia loĝloko. Mi aliĝis...kaj estis sola...

...Alvenis aŭgusto en la jaro 1968 kaj la okupacio de nia respubliko.

La dudek kvaran de la aŭgusto mi adiaŭis kun mia familio por ke mi estiĝu soldato. Mi, dek kvinjara knabo, kiu laŭ la opinio de la tuta familio taŭgis esti prefere kamparana instruisto ol armea oficiro...

...Ankoraŭ hodiaŭ mi aŭdas la vortojn de mia amata avino: „Preĝu knabeto kaj Dion ne forgesu! Se vi ekpenos, Dio al vi benos...”

...Do, mi pro neadekvata severeco de mia patro tute nekompreneble fuĝis de mia hejmo en komunisman materialisman imperion. Kun pli kaj pli da jaroj mi vidas, ke tio estis mia fatala elekto kaj ĝis la jaro 1989 la materialismo venkis plene senmarĝene...

... Ĉiu scias, ke armeo estas ŝtato en ŝtato. Ĉio tie estas reverse. Deziru, ne deziru, ordono estas, iru! La vivo en la armea gimnazio estis tre malfacila, iam eĉ terura. Per unu frazo: temis pri totala lavpurigejo de cerbo. Ĉiutaga ĉikano. Ĉiutage mi mire gapis ĉio estas ebla...

...La ŝanĝoj apartenas al la vivo kaj la ŝanĝoj en mia plua vivo estis grandegaj. Ĉiutage mi elfrekventis la instruejon de la vivo. Mi tratabadis min en la lernejo. Ofte mi estis tedigita per la vivo.

...Ĉie regis la komunisma ideologio. Mia avo František ofte diradis: „Komunistoj estas ĉiokapablaj, ili iradas trans kadavrojn”.

...Post sukcesa ekzameno pri matureco en la armea gimnazio mi estiĝis grandespera venonta oficiro. Unu semajno antaŭ la tago de finaj ekzamenoj mi estiĝis, kontraŭ mia volo, same kiel la plimulto de miaj sukcesaj samklasanoj, kandidato de Kompartio. El rapide veturanta trajno ne eblas elsalti! Kompartio samtempe ankaŭ decidis, ke mi iros studi Armean altlernejon en Vyškov. Mi estiĝis tankisto.

...En la dua instrujaro en Vyškov mi sentis, ke komencis okazi io stranga. Mi komencis rikolti ĉiun kontraŭ komunisman agadon de miaj antaŭuloj. Proksimiĝis la tempo ŝanĝi la pozicion en Kompartio. La kandidata tempolimo finiĝis...La dudekjara kaŝludo de komunistoj el mia loĝloko en urbeto Stráž kontraŭ mia familio ŝanĝis je malkaŝa. Ili stariĝis kontraŭ tio, ke mi estiĝu oficiro. Sed mia studprospero estis eminenta. La altlernejestroj ruze komencis malplaĉigi

al mi la restadon kun nura celo, ke mi mem forirus. Ekzemple, ĉar mi jam estis de la jaro 1972 edziĝinta, mi devis soldati dum semajnofinoj, por ke mi ne povu viziti mian edzinon en Moravská Třebová. Kompreneble, alvenis ankaŭ ĉiutaga ĉikano. Dum nura duonjaro miaj komandantoj plenumis taskon de iliaj estroj, ĉar ili sukcese naŭzigis soldatservon al mi kaj mi post du jaroj de studado propra-pete foriris en civilon...Ree neniu ĉirkaŭ mi komprenis kio okazis...

...En civilo, estiel la ano de Kompartio mi vivtenis min per manlaboro, ĉar al komunisma polico mi ne estis akceptita. Kvin jarojn mi transportadis kun ŝarĝaŭto meblon. En la jaro 1979 eksonorigis ĉe niaj pordoj pensonara oficisto el malliberejo Mírov. Kompartiano, la pa-trujo bezonas vin helpi en malliberejo Mírov. Mi konfesas mian scivolemon. Mi prenis ĉi tiun novan postenon el scivolemo nur por unu monato: „alveni, vidi...kaj.. foriri „“ oni ekvidos, kio sekvos“....sed...la homo proponas, Dio disponas...

...Kiam mia familio post unu jaro transloĝiĝis al Brna valbaraĵo kaj mi komencis labori en la malliberejo Kuřim, mi konsciiĝis pri tio, ke mi povas esti en malliberejo utila ĉefe kiel pedagogo. Tiam, en profunda totalismo mi nenio sciis pri karmajogo..

Estiĝi pedagogo postulis havi altlernejon. Mi finis komunisman polican altlernejon en Prago (ĉeĥe VŠ SNB), kie estis la katedro de penologio, en la jaro 1988...kaj mi revenis post kvar jaroj en malliberejon Kuřim...

... Kiel inundo alkuris la jaro 1989 kaj komencis la tria parto de mia vivo.La dek sepan de novembro 1989 alvenis renverso. Mi ne estis tintinta per ŝlosiloj sur la placoj, ĉar de la antaŭa tago, la dek sesan de novembro, la mallibereja kuracistino konfirmis mian laboran nekaptulecon. Pro teruraj kondiĉoj en la malliberejo kaj pro fia atako de la ĉefo de la malliberejo mi psike kolapsis .

...Alvenis la nova tempo kaj mi tre hontis pro mia ceesteco en Kompartio. Mi hontis, ke mi en la vivo ne kapablis leviĝi kontraŭ la komunisma reĝimo kiel miaj antaŭuloj, ĉefe miaj patro kaj avo. Mi naive pensis, ke mi faras ĉion por la bono de miaj posteuloj...

...Bedaŭrinde, multaj el ni en la jaro 1990 naive opiniis, ke la tempo estas nia favoranto...Preskaŭ ĉiuj homoj komencis postkuri iluzia-ĵojn de kapitalismo...Ĉiuj naive volis esti riĉaj en la blinda kredo, ke ĉio, nia nova granda riĉeco, efektiviĝos aŭtomate...sed al la granda plimulto de ni la novaj politikistoj eltiris la tapiŝon el sub ni.

...Dank'al Dio, la regado de kompartio finiĝis, ĝia gvida pozicio en la Konstitucio falis...ree ni libere enspiris...

... Mi ree komencis libere viziti liturgion. Sed nur mallongan tempon. En mia libroŝanko mi havis interesajn filozofiajn librojn, kiujn mi dum mia vivo aĉetis. Nun alvenis ilia tempo,mi komencis ilin studi. Ili estis dum la regado de totalismo ne akcepteblaj. Tre baldaŭ mi foriris el la katolika preĝejo, ĉar mi fine trovis la veron pri agado de la eklezioj.

En mia profesia vivo, ĉefe en la malliberejo Mírov mi ne estis sekura pri mia vivo. Mi ne vivis sate kaj glate.

Nun, dum la lasta fazo de la vivo mi povas diri, ke el la rigardo de spiriteco estis mia vivo justa, sed el la monda rigardo ĝi estis tre maljusta.